Maandblad - voor leden van FLE gratis.
Abonnementsprijs f 3.50 per jaar,
bij vooruitbetaling.

33ste jaargang no. 7 - juli 1964

Orgaan van de Bond van Arbeiders-Esperantisten FLE

Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nepveustraat 33[11], Amsterdam-West 2, telefoon (020) 8 21 77
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-Noord, postgiro 331133 Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

Kaŭzoj de la Milito (2)

3. La milito en tempoj antaŭaj

Ne estas mia celo meti vice ĉiujn faktojn rigardeblajn kaŭzoj de milito. Prefere mi restos inter limoj iom malpli vastaj kaj montros al vi kiel la problemo povos esti traktata. Tiucele mi elektis la militon historian, ĉar en ĝi oni en formo simpligita povos rekoni tion laŭ multe pli implika formo en milito moderna. Ĉe tio historia ekzakto ne estas nepra postulo; tasko estas trovi konkretan bazon por „pensmodelo". Poste ni malkovros kiom tiuj ĉi kaŭzoj validas ankaŭ por moderna milito. En tempoj pasintaj la plej grava fonto de enspezo estis la terkulturado. Sed la kulturebla grundo ne abundis kaj la kreskanta loĝantaro bezonis ĉiam pli da tero. Disponiĝis por tiu problemo nur du solvoj: malpliigo de la loĝantaro aŭ pliampleksigo de la disponebla kulturebla grundo. Solvoj nuntempe utiligeblaj, kiaj plibonigitaj kulturmetodoj, kulturado de virga tero kaj industriigo en tiu tempo ne ekzistis. Fojfoje la misproporcio inter nombro da loĝantoj kaj disponeblaj agroj malpligraviĝis per epidemio aŭ inundo. Sed se tiel ne restariĝis la ekvilibro, oni devis serĉi alian solvon. Ŝajne la milito estis bona rimedo por plivastigi la agrikulturan areon, sed per la milito la disponebla tero kompreneble ne plimultiĝis. Kion konkeris unu partio, la alia devis malhavi. Sed per la milito malpliiĝis la nombro da loĝantoj, pro kio la disponebla tero refariĝis sufiĉa por nutri la postvivintojn. Ĉi tie ni do vidas la avidon je tero kiel kaŭzon de milito kun malpliiĝo de la nombro da homoj kiel sekvo. En tiu tempo la milito, do, havis funkcion, nome la restarigo de ekvilibro inter amplekso de la loĝantaro kaj disponeblaj ekonomiaj fontoj. Sed malgraŭ tio, ke malsaton kaj malhavon oni povas rigardi la plej originaj kaŭzoj de milito, ili ne estas la solaj. Instruitaj de sperto la homoj anticipe faris kontraŭmilitajn aranĝojn. La historio montris, ke la popolo plej malmulte preparinta sin por milito, fariĝis la viktimo de la najbaroj kaj do estis necese ĝustatempe fari aranĝojn. La viroj ekzercis per armiloj, urboj plifortigis sin kaj forta militŝiparo estis konstruata. Sed same kiel estis la intereso de ŝtato aŭ civito ke ili estu fortaj, ilia intereso estis ankaŭ, ke eventuala kontraŭulo estu malforta. Ja temis pri tio, havi la certon esti la plej potenca en eventuala milito. Tiel, flanke de la origina-, la teravido, venis dua kaŭzo de milito: la sopiro al certo kaj sekuro. Ne plu la nura posedo de tero estis grava, sed ankaŭ esti la pli potenca.

Tiuj ĉi du klarigoj pri milito ambaŭ fontas el la intereso, la unua el la ekonomia, la dua el la strategia. Sed tiel la bildo ankoraŭ ne estas kompleta. Multaj serĉas la kaŭzon de milito ĉe la potencavido. Iliaopinie la milito okazas por konkeri potencon. La homoj tiel rezonantaj kredas, ke la homo laŭnature estas potencavida, ankaŭ se fakte tio ne estas en lia intereso. Tiu ĉi koncepto sendube enhavas iom da vero kaj ni rajtas kredi, ke ambaŭ, la intereso kaj la potencavido, respondecas pri la milito. Ili plifirmigas unu la alian kaj krom tio ili ne estas disigeblaj. Milito ĝuste tiam fariĝas neevitebla kiam la natura homa deziro al potenco estas plifortigita de la intereso.

4. La teknika revolucio

Gravaj ŝanĝiĝoj intertempe fariĝis: la socia kaj ŝtatjura organizado evoluis al novaj formoj, la tuta strukturo de la socio aliiĝis pro novaj ideoj, novaj metodoj de produktado, novaj interkomunikiloj kaj en la tekniko okazis reformo kiun titoli ni povas revolucio. Precipe ĉi lastenomita ŝanĝiĝo por la milito havas gravajn konsekvencojn. Dum la lastaj monatoj de la dua mondmilito tiu ĉi disvolviĝo atingis novan kulminon, kiam la unuan fojon servis la atomenergio al la milito. Je la 6-a de aŭgusto 1945 la unua atombombo ĵetiĝis sur la urbon Hiroŝima kaj la dua kelke da tagoj poste detruis Nagasaki. Klopodu ni ekhavi imagbildon pri la efiko de tiuj ĉi eksplodoj. Hiroŝima estis mezegranda havena urbo kun proksimume 250.000 loĝantoj, do tiom granda kiom Utrecht. Tiu unusola bombo detruis la pli grandan parton de la urbo. Sesdek nil japanoj mortis kaj centmil vundiĝis. Kiel vi povas konstati, malpli ol la duono el la nombro da loĝantoj restis nevundita. Sur la lokon de la plej peza eksplodaĵbombo, la t.n. blockbuster (detruanto de loĝbloko), kiu povis detrui tutan blokon da konstruoj, sin metis nekompareble pli forta armilo, kiu per unu bato povas detrui mezegrandan urbon.

Post tio ĉiam pli da landoj konkeris por si tiun armilon; Sovetio, Anglio kaj fine ankaŭ Francio. Oni devas atendi, ke tra la tempo ĉiam pli da ŝtatoj disponos pri pri tiu ĉi rimedo por amasa detruado. Kaj ne nur la atomarmilo iom post iom disvastiĝas tra la mondo, sed la detrua povo mem treege kreskis. Tio estas procedo plej eble bone prezentebla per ciferoj. La bombo ĵetita sur Hiroŝima havis eksplodforton je proksimume 20.000 tunoj da T.N.T. Post tio Usono kaj Sovetio disvolvis bombojn pli ol mil fojojn tiom fortajn. Ne plu oni kalkulas per miloj da tunoj, sed per milionoj da tunoj da T.N.T., aŭ alie dirite, ne per kilotunoj sed per megatunoj. La taksoj pri la sekvoj de atommilito en kiu ambaŭ partioj ĵetos unu sur la alian sian stokon de atomarmiloj, iom diferencas. Ili varias inter tiuj kiuj opinias, ke la koncernaj landoj estos tute detruitaj kaj la „optimistoj" kiuj kredas ke nur duone. Sed tiu „duone" estas nepre laŭlitera. Ĉiuokaze optimistoj kaj pesimistoj kalkulas per centoj da milionoj da mortintoj. Krom la bomboj mem ankaŭ la transportiloj por sendi ilin al la loko destinita estas perfektigitaj. En 1945 ankoraŭ peza bombaviadilo devis servi por porti la bombon super Hiroŝima. Nun la grandpotencoj disponas pri raketoj lanĉeblaj el la propra teritorio, kapablaj transporti en malpli ol unu horo kaj kun granda trafcerto hidrogenbombon al kiu ajn dezirata celo. Kiel konate, kontraŭ tiuj ĉi raketoj ne ekzistas defendo. Tio ĉi kondukis al fundamenta ŝanĝiĝo en la rilatoj inter armiloj defendaj kaj -atakaj.

En tempoj pasintaj la milito konis periodojn dum kiuj la defendaj armiloj estis pli fortaj ol la atakaj. Mi pensas pri la mezepokaj fortikaĵoj kiuj fakte estis nekonkereblaj, ĝis la eltrovo de la pulvo havigis la rimedojn fari breĉon en tiuj ĉi remparoj. Nu, la aktuala situacio estas ĝuste mala. Kontraŭ la atak-armiloj, la raketoj kun atom-kapo, ne estas eble defendi sin.

5. Kaŭzoj de la moderna milito

En la nova, dudekjarcenta situacio ni denove devas rigardi la demandon pri la kaŭzoj de milito.

Kiuj estas la kaŭzoj de moderna milito? Estas eble plej bone, ke ni komencu prezenti la demandon, kiuj el la kaŭzoj de antaŭaj militoj ankoraŭ efikas en la nuna tempo.

(daŭrigo de paĝo 47).

Malriĉo

Kiel unuan kaŭzon mi indikis la mankon je grundo. Ĉu ankaŭ en nia epoko ankoraŭ estas parolo pri malhavo kiel militkaŭzanto? Kompreneble hodiaŭ ne plu temas speciale pri tero, sed pri la tuto de aliaj eroj de la nacia riĉo, kiujn aldonis al ĝi la industriiĝo. La respondo al tiu ĉi demando estas, ke ankaŭ en nia tempo malriĉo pliigas la militpretecon, sed ke ne plu ĝi estas konsiderebla la senpera kaŭzo de milito. Ĉar la armilaro kiun necesigas la moderna milito estas tiom kosta, ke nur la plej riĉaj ŝtatoj povas permesi al si tiun lukson. Sed la antaŭhistorio de la dua mondmilito tre bone ilustras, kiel bone malriĉo en la hodiaŭa tempo provokas militon. Germanio per la paco de Versailles estis peze ŝarĝita; ĝi devis pagi al la venkintoj pro la malprofitoj kiujn kaŭzis kaj la elspezoj al kiuj devigis ilin la milito. Klinite sub tiu ŝarĝo, Germanio trafis en krizon post krizo. Tiom longe kiom Germanio restis malriĉa ĝi ne povis rezisti tiujn truditajn packondiĉojn perforte, sed kreskis spirito de kontraŭstaro kiu konsideris sian unuan devon restarigi la potencon de Germanio. La pleja danĝero naskis ekstremajn konceptojn kaj la leviĝon de la naziismo oni devas rigardi kontraŭ la fono de ekonomiaj krizoj. Kiam Germanio sub gvido de Hitler sukcesis liberigi sin de la premanta rekonstrupagado kaj revivigis la ekonomion, la glorado de la potenco kaj la milito samagrade pluvalidis; la rekonkerita prospero ne estis uzata por plialtigi la vivnivelon, sed investiĝis en la milit-industrio kiu en la daŭro de kelke da jaroj fulme kreskis. Nur kiam la lando reriĉiĝis kaj do fakte milito ne plu estis en la intereso de Germanio, ĉiuj kondiĉoj por nova fortokomparo kun la malamiko estis plenumitaj. Per tio ni do vidas, ke ne malhavo estis la senpera kaŭzo de la milito, sed ke ĝi estis la nutra fonto de konceptoj pluefikantaj kiam la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj jam superfluigis ilin.

Tiu ĉi malriĉo, ludanta ĉe la leviĝo de la nazi-socialismo rolon tiom gravan, ankoraŭ por multaj estas realeco. Ne estas neimageble, ke la malriĉon kaj la malegalon ĝin akompanantan oni povus aboli.

Se tio fariĝus sukceso, unu el la plej gravaj fortoj pelantaj al milito estus forigita. Malriĉo estas la origino kaj la fundamento de la komunista doktrino kiu instruas, ke la mistraktita klaso, la proletaro, neeviteble devos ribeli kontraŭ la riĉaj, la kapitalistoj, kiuj ekspluatas ĝin. La komunistoj prenas kiel deirpunkton, ke decidaj en la tuta vivo estas havo kaj malhavo. Tiuj, t.e. la materiaj cirkonstancoj, iliaopinie difinas la iradon de la historio, ne la ideoj kaj la libera volo de la homoj. Ne estas do mirige, ke ankaŭ la interrilatadon de la ŝtatoj ili interpretas tiel. En ilia doktrino ekzistas netranspontebla abismo inter la komunistaj landoj kaj tiuj kie ankoraŭ regas libera ekonomio kun privata posedo de fabrikoj, maŝinoj kaj la tero. Dum la lasta tempo ĝuste la komunistoj en Ruslando parolas pri paca kunekzistado. Per tio ili celas, ke ne estas necese, ke inter komunistaj-kaj kapitalistaj landoj eksplodu milito. En paca formo de kunvivado ambaŭ grupoj da ŝtatoj povus konkuri. Per si mem tiu ĉi tezo ne estas sensacia, ĉar jam longe la komunismo kalkulis pri konflikto inter la kapitalistaj landoj inter si kaj apenaŭ pri konflikto en kiun ĝi mem implikiĝos. Ke nun la rusoj tiom emfaze paroladas pri paca kun-ekzistado pruvas, ke ili bone konscias pri la danĝeroj de moderna milito. Sed koncerne la demandon ĉu ankaŭ en la nuna epoko malriĉo kreskigas la militemon estas dezirinde, ke ĉe tio rimarkiĝu, ke estas Ruslando kiu en la nuna tempo nepre volas konservi la eblon je paca kunvivado, Ruslando, kiu ja iom post iom povas kalkuli sin inter la ŝtatoj pli prosperaj. La rusoj jam revas pri tio, ke post kelke da jaroj ili superos la usonan produktadon kaj ke ili ĝuos pli altan vivnivelon ol kiu ajn lando en la mondo. Ne estas grave, ke ĉe tio ili vidas nur sin mem kaj kalkulas, ke intertempe Usono ne plu povos pliigi sian produktadon kaj ke aliaflanke ili havas rozkoloran imagbildon pri la propraj ebloj. Sed multe pli grave estas, ke ili mem havas esperon por la estonteco, la esperon ke la demando pri la malriĉo, almenaŭ en Sovetunio, post transvidebla tempospaco estos solvita.

Tiom do pri la malriĉo kiel kaŭzo de milito. Kiu estas, do, la signifo de la kaŭzoj de ni indikitaj en la nuna epoko?

(Daŭrigo sekvos)

Grava Peto

En oktobro 1963 S-roj E. L. M. Wensing (Nederlando), E. Carlén (Svedio) kaj B. Vogelmann (Germanujo) oficiale starigis la fondaĵon „Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio", mallonge: EKI. Ĝi kunlaboras kun UEA.

La taskoj de la Instituto estas multaj kaj gravaj. Ili ampleksas i.a. kompiladon de poliglota fakterminaro pri komerco kaj industrio kaj, surbaze de ĝi, verkadon de lernolibro(j) pri komerca korespondado.

Tiu ĉi laboro jam komenciĝis. Unu el la ĉeftrajtoj de la verkata terminaro estas ĝia difino de la komerce teknikaj terminoj kaj nocioj, ĉar antaŭ ĉio necesas ke la vortmaterialo estu normigita. Sur ĉi tiu tre grava tereno, kiun ni apenaŭ kulturis ĝis nun, ni ne povas riski lingvokonfuziĝon. Ni ankaŭ ne povas permesi al ni multobliĝon de laboro sekve de aktiveco de unuopuloj kiuj verkas kaj eventuale eldon(ig)as sendepende de aliaj esperantistoj laborantaj por la sama celo. Tial la ĉi-supra Instituto urĝe apelas al ĉiuj esperantistoj kiuj aktivas por enkonduko de Esperanto en komercon kaj industrion ne verki memstare aŭ eldoni ion sen antaŭsciigo al ĝi. La Instituto ne petas tion dezirante esti monopolema, sed nur ĉar ĝi kredas ĝin necesa el vidpunkto de efikeco kaj celtrafeco. Ni ĉiam agu praktike kaj ekonomie.

Oni povas turni sin al: Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, Aalsterweg 217, Eindhoven (Nederlando).

F. Munniksma (Amsterdam)

Lastmomente

atingis nin la sciigo, ke reelektiĝis k-do Faulhaber en la Akademio de Esperanto. Personoj estas reelektataj por la daŭro de 9 jaroj.

Al k-do Faulhaber ni deziras fruktedonan laboron en la Akademio en harmonia sfero, favore al la Internacia Lingvo.

Por la novaj Kursoj

Facile lerni Esperanton	f	1,90
La Komencanto	f	3,—
Nia Lernolibro	f	3,—
Examen doen, NCKE. stencilita	f	1,50
Petro (SAT)	f	1,90
Plena Vortaro, malgranda eldono	f	11,50
Meulenhof-zakw.-boekje	f	4,25
Tra la Labirinto de la gramatiko, Faulhaber, bind.	f	9,75
Tra la Labirinto de la gramatiko, Faulhaber, broŝ.	f	7,50
Post la kurso	f	3,—
La Konsilanto pri la Esp. gramatiko	f	3,60
De voorzetsels	f	3,—
Fundamenta Krestomatio	f	11,25
Fundamento de Esp. nova eldono	f	12,80
Lingvo kaj Movado	f	0,95
Gvidilo tra la Esp. movado kun Suplemento	f	1,95
Historia Skizo de la internacilingva ideo	f	1,50
Esperanto 60 jara	f	1,75

Propaganda-materiaal

Brochure „Esperanto de internationale taal voor iedereen", H. W. Alings	f	0.05
Brochure geel, „Esperanto de internationale taal", FLE	f	0,04
Raambiljet „Leer toch Esperanto", 40 x 36 cm. FLE per 10 ekz.	f	0,75
„Binnen de landsgrenzen" per 100	f	0,80
Raambiljet NCKE „Leert Esperanto en de wereld staat voor u open"	f	0,35

Libro-Servo FLE, Marnixstraat 57, Haarlem, Poŝtĝiro 111278.

Pro ferio de la libro-servantino la Libro-Servo de FLE estas fermata de la 23-a de julio ĝis la 22-a de aŭgusto.

LINGVA RUBRIKO

POR LA PROGRESANTO

Redakcia komitato:
E. BURGLER,
F. FAULHABER, W. F. KRUIT,
H. KUIJT, JAC. LEM Jr., J. W. MINKE,
J. PH. PUNT, C. P. WESTERVELD
Redakcia adreso: E. BURGLER,
Sportstraat 62, Amsterdam-Z.

Lingvo estas ekonomio (XIII)

En la antaŭa artikoleto vi eble konstatis, ke per konscia konsidero al la formo de la vorto vi eltrovas Amerikon ne unufoje sed multfoje, kaj eĉ per konsidero al la esperantovortoj vi trovas primitivajn formojn kaj signifojn kaj kelkfoje lernas trarigardi la originon kaj historion de la vorto kaj pensadon de niaj prapatroj.
Dum la verkado de ĉi tiu serio da artikoletoj mi trovis iun faciligan kaj komfortigan metodon por kunbalai la necesajn vortojn kaj ideojn, la fund-materialon por via legaĵo.
En la antaŭaj artikoletoj mi verkis pri la kreo de spirita signifo de la organoj de la homa korpo, pri la altiĝo de la mensa vivo de la homo. Mi nun mencias diversajn funkciojn, moviĝojn aŭ sintenojn de la homo kaj ni kune provu trovi la originon kaj eble interesajn deviojn kaj klarigojn.
Mi kredas, ke la primitiva homo estis ame komfortama, kiel ni modernaj homoj kaj ke li pli ŝatis sidi ol stari. Precipe li pli ŝatis sidi sur io, kio apartenas al li, por montri, ke li vere posedas ĝin. Jen jam ni renkontas vere primitivan formon: *posedi*, kiun ni senpense uzas. Ĉu vi ne trovis la radikon *sidi*? Li rajtis sursidi ion, do li posedis ĝin.
Kiam la pli strikte organizita socio evoluis, multaj homoj, speciale la poetamaj, aŭskultis kun sopiro al rakontoj pri siaj vagantaj prapatroj kaj estiĝis poetoj, kiuj pentris la homon kiel vagulon, kiu rompis la ĉenojn de rigida, malvasta, prema realo kaj volis trovi novajn landojn.
La modernaj sociologoj havas tute alian bildon. Ili konstatas jenan fakton: Kiam la homo trovas lokon kun komforto kaj trinko kaj manĝo, li ne plu emas nomadi, sed restas, sidas kaj posedas. Eble kelkajn obsedas la deziro al vagado, sed tiam tiu deziro *sidas* en ilia sango, *posedas* kaj *obsedas* ilin.
Jen malgranda kultur-devio kaŭze de la verbo posedi.

Alia moviĝo estas la *irado*, kaj ankaŭ tiu verbo montras sian primitivan kapon ĉirkaŭ la angulo. La nederlandanoj demandas al malsanulo, kuŝanta sur lito: *Kiel vi iras?* Al komercisto: *Kiel iras la aferoj?* aŭ: *Kiel staras la aferoj?* kaj ankoraŭ strange sonas por nederlandaj oreloj, kiam ili aŭdas germanon diri, ke *li ŝipiras per biciklo*. La kaŭzo estas ke originale la verbo *„varen"* signifis iri en ĉiaj manieroj, dum ĝi en la nederlanda lingvo specialiĝis al la signifo: *iri per boato*, dum ĝi montras sian primitivan haŭton en la vorto: *welvaren* kaj en la primitiva esperanto: *bonfarto* aŭ *bone farti*.
La angloj ŝajnas esti multe pli rapida aŭ rapidema popolo. Ĉio kaj ĉiu *kuras* en Anglujo. Oni *kurigas oficejon*, oni *kurigas departementon*, oni *kurigas la tutan landon* kaj fine oni *kurigas ankaŭ* multajn *ĉevalojn*. Sed pri tiuj aferoj oni almenaŭ povas diri, ke ili moviĝas, sed tapiŝon sur la bufedo, aŭ longan tapiŝon en la koridoro oni nomas *kuranto* kaj ne iranto, kiel en Nederlando kaj la fazeolojn, kiuj tre malrapide grimpas laŭ lato, oni nomas *kurantaj fazeoloj*.

S.A.

Kiel ni diru tion? *Jac Lem Jr.*

Preskaŭ.
Malpacience deziri foriri.
Rapidegante.
Plej detale.
Bukloj.
Baldaŭ.
Urĝi.
Tro rapida akcelo ne kondukas al celo; kiu tro pelas, veni malakcelas.
Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.
Rapidi.
Kameno; fajrujo.

OPGAVE 7.

1. Als je naar mij wilt luisteren zal ik je *haarfijn* vertellen hoe alles gebeurd is. 2. Dat jonge meisje met haar blonde *haarlokken* zag er aardig uit. Weet jij ook hoe zij heet? 3. Kindlief, wat ben je koud en nat! Waar heb je gezeten (vert.: waar ben je vandaan gekomen? Ga bij de *haard* zitten, dan word je weer warm (vert.: opdat je weer warm wordt). 4. Ik ben blij, dat ik weer thuis ben. Steeds weer ondervindt men: *Eigen haard is goud waard.* 5. Ik *haast mij* om aan uw verlangen te voldoen. 6. Stel nu niet langer uit, begin dadelijk, want *er is haast bij* de zaak. 7. Ben je *haast* klaar? Schiet op, wij moeten vertrekken, de trein wacht niet. 8. Kalm aan, wees niet zo zenuwachtig. *Haastige spoed is zelden goed.* 9. Heb je het boek ontvangen? Ja, ik ben blij, dat je mij er aan herinnert. Ik zou *haast* vergeten je er voor te bedanken. 10. Begin bijtijds de koffers te pakken, anders moeten wij straks alles *haastje-repje* doen (vert.: opdat wij straks niet alles haastje-repje behoeven te doen). 11. Ga zitten. Neen, laat ik dat niet doen, want *ik heb haast om weg te komen.*

VERTALING VAN OPGAVE 6.

1. La ĉano de fajropafilo estas elstaranta peco, per kiu oni frapas la prajmon por eksplodigi la pulvon. 2. Kial ĝuste via koko ĉiam devas kanti venkon? 3. Mi ne ŝatas tiun viron. Li apartenas al tiaj homoj, kiuj ĉiam fanfare montras lukson (afektas grandsinjorecon). 4. La fajrobrigado estas ĉiam helpopreta, kiam ie brulego (incendio) ekfuriozas. 5. Li ĉiam sin okupas pri ĉio kaj pri ĉiu. Li volonte estas la matadoro. 6. Jes, kara amiko, mi scias, mi havas kalvan (senharan) kapon, sed ne moku min, ĉar ankaŭ vi jam sufiĉe senhariĝis. 7. Ne ŝajnigu vin tiom senkulpa (naiva), ĉar vi tute ne estas pli bona ol via amiko. 8. Mia piedo elglitis, mi preskaŭ falis en la akvon. 9. Ĉesu mi petas (bonvolu ĉesi). Kial vi do ĉiam tiom vigle (pasie) interdisputas? 10. Post ega kverelo la virinoj furioze ekbatalis; oni nur pene povis disigi ilin. 11. Kial vi ne agis laŭ mia konsilo? Nun vi ne scias kien vin turni (kion fari). 12. Ni streĉos ĉiujn niajn fortojn (ŝparos nek monon, nek penon) por atingi nian celon.

Ĉu Esperanto vere vivas?

J. Ph. Punt

OPGAVE 7.

Beste Piet,

Jij bent er wel achter. Je bent zeker op die kursus geweest: „Hoe wordt ik een goocheme jongen". Maar je hebt goed gegokt; natuurlijk kom ik je helpen. Ouwe vrienden laten elkaar niet in de steek. Bovendien lokt het vooruitzicht van een prettige dag ons ook wel aan. We houden het dan maar op de tweede paasdag. Uit het gebruik van het persoonlijk voornaamwoord kun je afleiden, dat Sonja ook van de partij is. Nu kan het nog. Wat dat laatste zinnetje betreft, daarover moeten jullie samen maar eens nadenken. Ik denk, dat Ingrid er wel gauw achter zal zijn. Vrouwen hebben daarvoor een zesde zintuig. Je hoeft geen materialen te kopen. Ik heb onlangs voor mijn baas een installatie gesloopt en daarvan is meer dan genoeg overgebleven om jouw schuur mee te verlichten. Het kost mij niets en arbeidsloon hoef je ook niet te betalen. Wij zijn die dag bij jullie in de menage en dat is ook wat waard. We zijn van plan vroeg te komen. We kunnen dan samen nog voor de koffie dat karweitje plat hebben. Je hebt het dus goed gesnapt; wij, d.w.z. dat jij ook de handen uit de mouwen moet steken. Over de namen van de te verwerken materialen nog dit: Een stopkontakt is een kombinatie van een stroomgevend en een stroomontvangend deel. De kontaktdoos, (het stroomgevend deel), is in de regel bevestigd aan wand of toestel. De kontaktstop is bevestigd aan een verplaatsbare leiding. Het stroomgevende deel aan de wand is een buskontaktdoos, maar als het is bevestigd aan een toestel, heet het penkontaktdoos. Kijk er de stofzuiger en het daarbij behorende snoer maar eens op na. De kontaktstop kan ook en pen- of een buskontaktstop zijn. De eerste heet dan gewoon kontaktstop, de tweede heet óf koppelkontaktstop óf toestelkontaktstop. Ziezo, dat was uit de hogeschool van de elektro-technische nomenclatuur. Bedenk echter wel, dat Wilhelmina ook kijkt als er Mientje wordt geroepen. (Vroeger tenminste; tegenwoordig hoor je nogal eens fantasie-namen). Maar in de winkel geeft dat geen problemen. En verder schrijf ik niets meer, anders zou er niets meer te praten overblijven. Dus, tot kijk dan. Veel groeten van Frits en Sonja.

VERTALING VAN OPGAVE 6.

Ŝajnas al mi prudente, apliki en la budo akvo-imunan materialon. Mi pretigis desegnaĵon, sur kiu vi povos vidi kie sidu lampo, ĵak-kontakto kaj komutilo. Vi do diru kion mi aĉetu kaj kiel tio nomiĝas.
Jam anticipe mi scias, ke mi estos de vi kritikata pri la nomindiko de tiuj artikloj, sed volonte mi volas iom lerni. Vi sciigu ankaŭ, kiam vi povos veni. Kompreneble la sabato estas la plej konvena tago, sed se ne povos okazi alie, vi venu alitempe. Se vi venos frue kaj kunvenigos la edzinon, ni povos aranĝi agrablan tagon. Vi ambaŭ samokaze povos mencii kiujn planojn vi havas por la ferioj. Ie en mia cerbo ja vivas la ideo pri komunaj ferioj. Ĉu vi vizitis la ekspozicion de bicikloj kaj motorcikloj? Sed pri tio ni informiĝos poste. Do, knabo mia, ne lasu min sidi en la kaĉo. Kaj cetere: ĝis revido. Korajn salutojn, ankaŭ al Sonjo, de

Peĉjo kaj Injo.

Esploru vian scion!

H. Kuijt

OPGAVE 7.

Op een van die, àl te zeldzame, wondermooie dagen welke wij mochten beleven, liet ik mij door niets weerhouden en besteeg mijn fiets. Ik wilde, na die eindeloze, trieste winter, van de zomer plukken wat er van te plukken viel.
Het was een doordeweekse dag en dus was het stil op het duinpad, op welk pad ik graag rijd omdat het voor bromfietsers is verboden en omdat dientengevolge, mede dank zij de zeewind, de lucht daar zo zuiver is.
Een paar honderd meter voorbij het pad dat rechtsaf voert, zag ik een gezelschap konijntjes. Dank zij de geruisloze fiets was ik al dicht bij hen voor zij mij in het oog kregen en, na mij nog even nieuwsgierig te hebben bekeken, wegwipten tot achter het prikkeldraad, waar zij zich veilig wisten.
Nog wat verder stapte een jonge fazantenhen op het wielerpad rond. Ik liet mij van het zadel afglijden en zette beide voeten op de grond met de bedoeling haar voor mijn cameralens te krijgen.

(slot volgt).

VERTALING VAN OPGAVE 5.

Ankoraŭ ne tute la neĝo malaperis — la vintro estis severa kaj monatojn sinsekve ĝi regis ĉion. Sed la anseroj denove formigras kaj la zumado de iliaj flugiloj estas unu el la antaŭsignoj de la proksimiĝanta printempo.
Larĝe batante ili flugas orienten; en unu formacio post la alia ili reiras al la lokoj kie ili, kiel olivoverdaj, veluraj buletoj, palpebrumante eniris la mondon.
Ili ne prosperis la pasintajn monatojn. Multaj el ili fariĝis viktimoj de neĝo kaj frosto, kaj tiuj, kiuj travivis la vintron, nur kun granda peno povis refortiĝi.
Ankaŭ la sciuro vekiĝis el sia rigideco kaj forŝutis la vintran malviglon. Mizeron ĝi ne konis; ĝia provizejo tute ne elĉerpiĝis. Dum semajnoj la malvarma sudorienta vento blovis tra la senfoliaj kverkoj kaj pro tio ĝi ĉiufoje, same senbrue kiel ĉe la veno, rerapidis al sia kugloronda vintrorestejo. Tie nenio minacis ĝin; eĉ pri la glacia frostovento ĝi ne bezonis fari zorgojn.
Sed post kiam la vento venas el la kontraŭa direkto, ĝi malfacile povus forsonĝi la tagojn en sia nesto. Nur kiam la pluvo ĝenas ĝin, ĝi kiel eble plej rapide serĉas sian kaŝejon. Plej volonte ĝi engrimpas unu arbon post la alia aŭ ludas kun aliaj sciuroj kiuj ankaŭ ĝojas pro la proksimiĝanta printempo.

VERTALING VAN OPGAVE 6.

„Patro", dektrijara knabo petis, „ĉu vi permesas ke mi glitiru?"
„Niko", la patro respondis, „se vi opinias, ke vi disponas pri la tempo por tio, vi nepre iru."
La knabo mire rigardis.
....„Se mi opinias, ke mi havas tempon por tio....", li nekomprene ripetis la vortojn de sia patro, „Kion vi celas per tio, patro?"
„Mi celas", diris la patro, „ke vi mem pli bone scias, kiom da lerneja laboro vi havas por morgaŭ kaj kiom el ĝi vi jam pretigis.'
„Jes, sed".... balbute diris la knabo, „mi ja ne povus diri ĉu mi rajtas iri.... VI diru tion!"
„Mi lasas tion tute al vi.... se vi opinias, ke estas eble por vi iri, vi kompreneble iru.... vere vi mem pli bone scias tion," la patro respondis.

Lernu ludante, ludu lernante

J. W. Minke

La krucvort-enigmo de la maja numero altiris sufiĉe multe da atento. Ŝajnas al mi, ke tiu tipo pleje allogas nian enigmoamikaron, ĉar ĝi ne apartenas al la „absoluta" enigmo, kiu permesas nur ununuran solvon. Ankaŭ la krucvort-enigmo de k-do v. Dijk lasis iom da libero en la elekto precipe de la du- aŭ triliteraj vortetoj. Ne ĉiuj el la solvintoj bone atentis la priskribon, kiun mi ĉiam severe kontrolas kun *Plena Vortaro* en la manoj por esti tute certa. K-do Henstra ne samopinias kun mi pri: horizontale 24. *adverbo*, ĉar „da" ne estas adverbo. Domaĝe por vi, kamarado, kiu faris tiom da peno por solvi la enigmon, sed 24. horizontale *ne* estas „da" sed „ja"!
Solvojn mi ricevis de: H. J. Bachofner, Bolsward; J. Bishoff, Laren N.H.; L. Bruijn-Bas, Wormerveer; B. Busscher-Tuin, Finsterwolde; J. Derieuw, Antwerpen; J. Foquet, Berchem-Antwerpen; A. Henstra, Arnhem; H. Hooghuis, Haarlem; J. Kesselring, Rotterdam; J. Kuijpers, Rotterdam; A. Reiné, Eindhoven; J. v. d. Rhee, Weesp; E. Weiberle, Rotterdam; P. Wolfs, Wilrijk, Antwerpen; kaj de H. Keuter el IJmuiden, kiu estas la triumfinto tiun ĉi monaton. Pri tio mi gratulas lin tutkore. Mi estas konvinkita, ke la diino de la homa sorto tiel decidis, ĉar ŝi ĝuis pri la vere bela aranĝo de la enigmo.
Pro manko de spaco mi devas silenti pri la ĝusta solvo; cetere la eraroj, kiujn kelkaj el vi faris, estas tiom sensignifaj, ke mi povas facile neglekti ilin. Mi rezervu la restantan spacon por prezenti al vi la novan enigmon. K-do J. Koning el Paterswolde estas ĝia „spirita patro" Li titolis ĝin

JUVELŜTONA EMIGMO

ĉar vi devas serĉi la nomon de 9 juvelŝtonoj, kiujn vi bonvole aranĝu jene:

```
. . E . . . .
S . . . . . .
. . P . . .
. E . . . .
R . . . . .
. . A . . . .
. N . . . .
T . . . . .
. . . . . O
```

kaj kiujn vi povas kunmeti el la sekvantaj 18 vortoj, alfabete aranĝitaj:
at - at - dati - ebl - en - greno - iro - kono - larmo - mano - meti - pozo - rubo - sed - si - suko - taso tri.
Helpe de la literoj, kiujn mi jam metis por vi en la ĝustan lokon (formantaj la nomon de nia kara lingvo ESPERANTO) vi certe sukcesos solvi la „misteron de la kaŝitaj juvelŝtonoj". Sed, vi devos iom dedukti kaj kombini, ĉar vi ne *rekte* povos trovi la 9 juvelŝtonojn, kombinanta pare la 18 vortojn. Tion vi ja komprenis jam. K-do Koning deziras lasi iom da peno kaj cerbumado, ĉar tio estas integra parto de la ĉarmo, kiu ĉirkaŭas enigmon. Sen tio ĝi ne estus *enigmo*.
Sendu vian solvon rekte al mia adreso: Veeteelstraat 144, Amsterdam-O plej laste 15.8.64, se almenaŭ la ferio ne forprenis de vi ĉiun ŝaton en tiu ĉi bagatela kvankam lerniga amuzo.

Senvorte la knabo retiris sin al sia ĉambreto.
Post kelkaj horoj li brue desaltis la ŝtuparon. „Patro", li vokis jam antaŭ kiam li fermis post si la pordon, „mia tuta laboro estas preta! Ĉu vi permesas, ke mi nun glitiru?"
„Tion vi bone scias", estis la respondo kaj tiam la patro firme premis la manon de sia filo kaj daŭrigis: „Mia vireto, mi kredas, ke ni komprenas nin reciproke bonege, ĉu ne?"
„J-jes, patro", la knabo murmuris ruĝiĝante.
„Ĉu tio estis ne iel tro severa?" mi poste demandis al tiu patro. „Vi ja povis diri ankaŭ „ne", kiam li petis vian permeson."
„Mia filo tute ne petis permeson por iri."
„Kaj li ja petis..?"
„Jes, certe... li petis konsenton por foriri, sed li celis ion tute alian; nome, permeson por neglekti ion, sciante ke tio estus malĝusta".

Antaŭ la elementa ekzameno

P. C. Westerveld

OPGAVE 7.

Idylle.
Nog steds is er geen vrede tussen Israel en zijn Arabische buurlanden, bijgevolg gebeuren er soms plaatselijke konflikten aan de grenzen.
Dwars door Jeruzalem gaat de wapenstilstandsgrens, die het arabische stadsdeel van het nieuwe hebreeuwse scheidt. Dat daar niet altijd vijandschap heerst, bewijst het interessante en hoopgevende verhaal, dat een of andere krant gaf met het opschrift: Idylle.
Het huis van mevrouw Mirjam Mizrachi ligt aan die grens. Haar kippen lopen in haar tuin rond en zijn niet precies op de hoogte (konas) van wapenstilstandsgrenzen, niemandsland, enz.
Nu en dan leggen de kippen van Mevrouw Mizrachi hun eieren op het grondgebied van het koninkrijk Jordanië.
De Jordaansche soldaten, die aan de andere kant van mevrouw Mizrachi's tuin patrouilleren, verzamelen de „vijandelijke" eieren regelmatig. Als ze een goede bui hebben (bonhumoraj) en als hun officieren niet in de nabijheid zijn, brengen ze de korf met eieren naar de wettige eigenares. Dan ontvangen ze een beloning. Mevrouw Mizrachi onthaalt hen op koekjes en chocolade. Dat gebeurt zo al heel lang en als de Verenigde Naties zich er maar niet mee bemoeien (enmiksi sin) dan kan het particuliere vredesverdrag nog lang funktioneren.

VERTALING VAN OPGAVE 6.

Kion faras la homoj, kiam ili havas libertempon aŭ kio estas la plej ŝatata okupo?
Pri tio troviĝis artikolo en iu ĵurnalo: Iu magistrato ĉiam vizitas entombigojn, kiam li estas en eksterlando. Entombigo en Venezio aŭ en iu norditala montvilaĝeto estas tiom interesa, ke li tien trenas eĉ la edzinon kaj la infanojn.
La plej granda plezuro de iu nederlanda politikisto estas la fosado de fosoj.
Rooseveld tre ŝatis montri al siaj gastoj sian mirigan arton antaŭtranĉi grandan viandon en tre maldikajn tranĉaĵojn.
Churchill incitas la cignojn, kiuj troviĝas ĉe lia kampdomo.
Iu kuracisto tiom ŝatas la naĝadon, ke li eĉ en vintro hakas truon en la glacio por naĝi.
Kelkaj studentoj volonte pristudas la malmultajn personojn, kiuj pasigas la Sankta-Nikolao-vesperon en soleca trinkejo.
Iu laboristo, kiu devas kartludi la tutan vesperon kun sia edzino, rifuĝas al la subtegmentejo por ripari biciklon.
Lia ununura zorgo estas, ke la motorbiciklo iun tagon funkcios. „Tiam mi ne plu scios kion fari", li diris al la statistikisto.

Esperantaj Eldonaĵoj

Ĉefa Estraro de Pola Esperanto — Asocio, Nowy Świat 27, Warszawa, konstante aperigas novajn esperantajn eldonaĵojn, kiel lernolibrojn, vortarojn, legolibrojn, novelojn ktp. Tiuj ĉi eldonaĵoj estas haveblaj eksterlande pere de la Centro de Eksterlanda Librokomerco „Ars Polona", Krakowskie Przedmieście 7, Warszawa, kaj ĝiaj reprezentantoj. Eventuale mendu pere de nia Libro-Servo.
Nuntempe haveblaj estas jenaj eldonaĵoj:

1. *R. Dobrzynski:*
   Kantu kune/kantareto kun notoj/.La kantareto enhavas 22 kantojn plej volonte kantataj de esperantistoj. Kelkaj de ili estas prilaboritaj je 3-4 voĉoj por amatora ĥoro ..... *f* 1,20
2. *B. Prus:*
   La Faraono/romano, 3 volumoj, binditaj/. La tria eldono de la historia romano de pola klasikulo el la historio de la antikva Egipto ..... *f* 21,60
3. *H. Sienkiewicz:*
   Quo Vadis? /romano/. Eminenta romano el la tempo de roma imperio sub la regado de Nerono, tradukita de filino de la kreinto de Esperanto..... *f* 6,—
4. *Z. Wójcikiewicz:*
   El la vojaĝo tra Eŭropo/albumo, teksto dulingva/. Albumo kiel rezulto de kelkfoja aŭtomobila vojaĝo tra Eŭropo. Propraj travivaĵoj, turismaj aventuroj kaj rimarkoj kun multaj ilustraĵoj *f* 4,—
5. *A. Szczypiorski:*
   Sub la nobla ĉevalo/kriminala romano/. Rakonto en facila lingvo, povas servi kiel legaĵo por partoprenantoj de komencaj kursoj ..... *f* 1,20
6. *Esperanto?:*
   /eldiroj pri Esperanto de famaj polaj verkistoj kaj intelektuloj/. Kolekto de opinioj kaj vidpunktoj pri aferoj de Esperanto, kiel lingvo, rimedo por internaciaj interrilatoj kaj ankaŭ kiel socia movado ..... *f* 2,—
7. *Medalo L. Zamenhof:*
   arĝentita kun skatolo ..... *f* 8,—
8. *Medalo L. Zamenhof:*
   bronza kun skatolo ..... *f* 7,—

Alvoko

Por starigo de propaganda ekspozicio en lernejo, ni petas al ĉiuj gesamideanoj pri esperantaĵoj rilatantaj al lernejo, radio, komerco, fervojo, turismo, kooperativo, arto, sindikatismo, politiko, tekniko kaj scienco.
Sendu al s-ano M. van Aelst, 56, Bd. T. Lambert, Bruxelles 7, Belgio.
Oni atentu tamen ke inter 14 julio kaj 15 aŭgusto lia hejmo estos senhoma. Dankeme ni rekompencos.

La aŭgusta numero de Laborista Esperantisto samtempe estos eldono de Esperanto Wint Veld. La sekcioj ĝustatempe mendu bezonatajn kvantojn krom la kutimaj kvantoj al la Asocia sekretario, Nepveustraat 33", Amsterdam.

Kontribuoj al la propagando-eldono estas bonvenaj kaj estu sendataj al supremenciita adreso.

Nova eldono

Baldaŭ aperos nova libro el la fabeloj de Andersen, ĝi enhavos 3 fabelojn nome: „La novaj Vestoj de la Imperiestro", „Hans Fuŝulo" kaj „Estas tute Certe". La tuta libro ampleksos 48 paĝojn el kiuj 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj, 21 × 27 cm. bindita, la prezo estos fl. 7,50.
Eldonejo Koko jam aperigis „La Marvirineto"n antaŭ du jaroj. Se la nova eldono sambele aspektos, ni povas rekomendi ĝin. Mendojn akceptas nia Libro-Servo, Marnixstraat 57, Haarlem.
Cetere ni mencias ke „La Marvirineto" estas havebla el stoko, prezo *f* 7,50.

Plena Vortaro

Dimensioj de la libro 120 x 176 mm.
Dimensioj de la teksto 97 x 147 mm.

Papero pure blanka.
Foto-reprodukto perfekta; literoj kaj signoj pli nete legeblaj ol sur la pariza eldono.
Kovrilo supla el vinilo kun orumita titolo sur la faco kaj sur la spino.

Ĉiu ekzemplero ŝirmata en jaketo plasta. Pezo 370 gr.

Prezo *f* **14,50**

Membroj de SAT 10% rabato.
Libro-Servo Marnixstraat 57, Haarlem.

Portu vian insignon
Montru vian konon

Multaj esperantistoj en diversaj landoj, petas al siaj estraroj elspezi multan monon por fari propagandon per belaj afiŝoj. Tamen tiuj petantoj neglektas la plej simplan kaj efikan propagandon, ĉar ili ne plu portas esperantan insignon.
Se ĉiu parolkapabla esperantisto akirus verdan nazon, la mondo estus mirigita pro tiom da verdnazuloj.

Verdstelulo

"... Miaopinie la sprita aŭtoro estas dua Jonathan Swift, kies esplorema Gulliver fariĝas indiĝeno, kiu laŭ inversa direkto vizitas nin, por satiri en dekunu amuzaj ĉapitroj niajn strangajn kaj absurdajn kutimojn. Kompreneble, troviĝas multe da pensigaj pikparoloj, kiuj sukcese trafas la najlon, tieldire sur la kapon ..."

Tiel tekstas parto el la recenzo pri La Papalagoj en New Zealand Esperantist. Ĉu plia rekomendo niaflanke estas necesa? Ni opinias vin sufiĉe saĝaj mendi la libreton antaŭ viaj ferioj, por ke en la libertempo vi plene ĝuu ĝin.
La Libro-Servo atendas viajn mendojn. Skribu al Marnixstraat 57 en Haarlem.

La Sciureto

(Prononc-kanto)

Teksto: Gé Roelofs — Muziko: Lou Visser

Mi konas sciureton
Kun brunĥaosa vost'.
Ĝi ŝatas nuksmaĉadon,
Nur lasas ŝelojn post.
Ĝi estas ŝercemulo,
La branĉoj ŝirmas ĝin.
Mi sensukces' ĝin serĉas,
Dum ĝi minacas min. } 2 ×

Al mia ĉapo ĵetas
Kun peĉo kaj rezin',
Senĝene ĝi oscedas
Dum ĝi incitas min.
Sciencan scenon ludas
En la ĝardena heĝ'
Senĉese sed ĝentile
Mia sensceptra reĝ'. } 2 ×

Ĝi ŝmacas, ŝmiras, ŝtelas,
La gaja sciuret'.
Ĉikanas, ĉitas ĉasas,
Sed restas amiket'.
Helpanto ĉe prononco,
Parola ekzercar'.
Por langakrobatismo,
De l'esperantistar'. } 2 ×

Tio ĉi estas kanto el nova kantaro ĵuseldonita. Kial nova kantaro? Ĉar....." ..... Originalaj Esperantokantoj apenaŭ ekzistas. Ni sentis tion kiel mankon, ĉar ni opinias ke originalaj Esperanto-kantoj, same kiel originala literaturo, havas propagandan valoron por nia movado kaj samtempe havas valoron kiel ligilo inter la esperantistoj. Tial ni klopodis mem verki serion da novaj kantoj kaj ni forte esperas, ke ili trovos sian vojon en nia movado."
Tiel tekstas parto el la „Celo de la aŭtoroj". Tiuj aŭtoroj estas k-do Gé Roelofs, kiu verkis la tekstojn kaj k-do Lou Visser, kiu prizorgis la muzikon. Ekzemplerojn oni mendu ĉe k-do G. Roelofs, Gerard Callenburgstraat 4, Amsterdam, Nederlando. La prezo de la kantaro „Esperantistoj Estas Ni": *f* 0,90, Sekcioj de FLE ricevas 10% da rabato.

Esperanto en la radio

Okaze de la 49a Universala Kongreso la radio-elsendejo VARA (laborista radioelsendejo) disponigos tempon por Esperanto kaj la nomita kongreso je sekvontaj datoj. Sabato la la aŭgusto, lundo la 3a, merkredo la 5a kaj sabato la 8a, ĉiuj vesperoj de la 18.55a ĝis la 19.00a horo.
La vendredvespera elsendo „Socialista novaĵo en Esperanto" okazos kiel kutime.

Faulhaber-fondaĵo

saldo semajnfino	*f*	14,93
k-do De Greef, Utrecht	*f*	3,—
k-do Winkel, Schagen	*f*	0,60
k-do De Goey, Rotterdam	*f*	2,50
k-dino v. d. Hengel, Rotterdam	*f*	2,50
k-dino Obbes, Rotterdam	*f*	5,—
k-do Kenter, IJmuiden	*f*	5,—
k-dino Faber, Zwollerkerspel	*f*	2,50
k-dino Pongers, Zwollerkerspel	*f*	1,—
k-do Faber, Zwollerkerspel	*f*	2,50
k-do de Vries, Amsterdam	*f*	5,60
k-dino De Vletter, Rotterdam	*f*	10,—

Nian koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Naar aanleiding van onze oproep in „Kontaktilo" ons mede te delen in welke hotels of kantines onze suikerzakjes zijn geplaatst, kregen wij de volgende opgaven:

AMERSFOORT :

Hotel Monopole, Stationsplein 6
Hotel Astoria, Langestraat 115
Volksgebouw Amershof, Snoeckhaertlaan 11
Firma van Heugten, Koppelweg 2

GRONINGEN :

Hotel-Rest. Frascati
Café B. Bolwijn, Ruischerbrug
Confectie Industrie „Zwacon"
Studentencentrum „Prof. van de Leeuw"

ZWOLLE :

„Venduhuis", J. G. Richter, Praubstraat 19
Stationsrestauratie in Kampen
Lunchroom A. N. de Kleine, Luttekestraat 22
Personeelsveren. Gem. Stortingsdienst, Burg. v. Royensingel
Café Lunchroom Het Centrum, Gr. Kerkplein 7

AP-SERVO! Komunikaĵo de A.P.-BOEKENBEDRIJF
Hekelveld 15 - Amsterdam-C
Ĝirkonto 21876

Novaĵo pri Esperanto - libroj

Volonte ni atentigas vin pri kelkaj gravaj novaj verkoj:

NEDERLANDO

(n-ro 1 de nova serio LA MONDO EN KOLOROJ)
Poŝformata libro kun belegaj kolorfotoj de mondkonata nederlanda fotografisto KEES SCHERER. La nederlandan tekston prizorgis JAAP ROMIJN la direktoro de la eldonejo A. W. BRUNA & ZOON, dum F-ino M. H. VERMAAS, la direktorino de U.E.A. tradukis ĝin en Esperanton.

Eksterordinare taŭga donaclibro!

Prezo *f* 3,50
broŝ *f* 11,40
bind. *f* 14,40

TRIDEK TRI RAKONTOJ
Redakto de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi.
Brila kolekto de originala Esperanto-prozo.

FRISAJ RAKONTOJ ± *f* 5,50
Dudek noveloj de bonkonataj frisaj aŭtoroj.

SUB LA SIGNO DE LA VERDA STELO *f* 3,60
Diverslandaj Esperantistoj rakontas interesaĵojn el sia Esperanto-vivo.

LA DUA A.P.-LIBROLISTO
Pli ol 200 titoloj kun priskriboj (aperos en julio)

Senpage havebla ĉe A.P.-LIBREJOJ aŭ A.P.-BOEKENBEDRIJF, Hekelveld 15 - Amsterdam-C.

MENDU ĈE AP-LIBREJOJ

A.P. ankaŭ volonte plenumas mendojn por libroj en lingvoj nederlanda, angla, franca, germana ktp.

AP-LIBREJOJ povas liveri
librojn por ferio
librojn por studo
faklibrojn kaj
librojn por la junularo

AP-LIBREJOJ estas fonditaj en

Amsterdam, Rotterdam, Den Haag, Utrecht, Hilversum, Arnhem, Groningen, Leeuwarden, Leiden, Delft, Vlaardingen, Zaandam

El la sekcioj ★

AMERSFOORT
Vermeerstraat 16

En la monatoj julio kaj aŭgusto ni ne okazigos konversacivesperojn pro la ferioj.
Ni esperas kunveni la 12-an de aŭgusto en Amershof. Prelegonto estas korespondanto de k-dino Poort, el Bulgario. La membroj ricevos invitilon.

La estraro.

Amsterdam

In het kader van het 20ste Internationaal Jeugdcongres zal een toneeluitvoering plaatsvinden door het „Internacia Arta Teatro".
Vier eenacters van Ionesco, Pirandello, Matkovic en Tsechov staan op het programma. De uitvoering vindt plaats in het Roothaanhuis, Rozengracht 132. Het organiserend komité stelt een aantal plaatsen beschikbaar voor Amsterdamse esperantisten, die deze het bekende J.A.T. te zien spelen, niet willen missen. De gemiddelde toegangsprijs per congresdeelnemer bedraagt f 3,50, welk bedrag eveneens voor de overige bezoekers geldt. Deze krijgen dan eveneens het congresboekje. Door het bestellen van dit boekje met vermelding „J.A.T.", door overschrijving van f 3,50 op postgirorekening 686965 t.n.v. 20 ste I.J.K. **Zaandam**, verzekert men zich van een culturele avond op hoog niveau. Overige inlichtingen bij het secretariaat: Kastelenstraat 231, Amsterdam.

10-jarig bestaan Utrechts Esperanto Komité

Op 22 juli zal het 10 jaar geleden zijn, dat besloten werd tot samenwerking tussen LEEN, FLE, KUNE, NKE en FERN afdelingen te Utrecht.
Door deze samenwerking is veel bereikt en dit zal, door de komende plaatsing en onthulling van het Esperanto-gedenkteken in de Zamenhofdreef, in het plan Overvecht te Utrecht, haar bekroning krijgen.
Omdat deze datum zich slechts leent tot een openbare viering van dit heugelijke feit, wordt deze uitgesteld tot 25 september a.s. Men hoopt dan in het Erasmushuis, Oude Gracht, een openbare bijeenkomst te kunnen houden, waar iedereen van harte welkom is.

Vakantie

Wanneer u met vakantie gaat wensen wij u een heerlijke tijd toe met zon, veel zon! Heerlijk niet, zo'n periode van rust en zalig niets doen. Ook onze afdelingen doen het nu iets rustiger aan.
Vergeet ondertussen echter niet ook nu de mogelijkheid van informatie door en over Esperanto te gebruiken.
Wij denken hierbij aan de vele bezoekers van het Universala Kongreso in Den Haag waarvan wellicht iemand een bezoek brengt aan uw woonplaats. Onderzoek dan eens de mogelijkheid tot het houden van een lezing bijvoorbeeld over sociale toestanden in sprekers land. Speciaal interessant waar het iemand betreft uit een voor ons tamelijk „gesloten" gebied zoals Oost-Europa of Azië. U kunt hiermee dubbel succes oogsten: de leden hebben een interessante avond, de buitenwereld toont nogmaals het nut van onze Internationale Taal.